**PILO-PRESS**
Radia eldono

Speciala eldono 1/1974

Fariĝu aktiva
Aŭskultanto de
Esperanto-
elsendoj

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 2
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

Enkonduke.....

Radio-elsendoj en Esperanto sendube estas unu el la plej gravaj aplikoj de Esperanto en la praktiko kaj en la ĉiutaga vivo. Jen estas servoj por la uzantoj de la internacia lingvo, kiujn ne pagas la esperantistoj, sed ŝtataj instancoj. Sed tion tiuj instancoj ne faras por "antaŭenigi Esperanton", sed ĉar ili opinias, ke Esperanto estas same kiel alia lingvo taŭga ilo, por informi kaj varbi por propraj celoj kaj ideoj.

Tiu speciala eldono de Pilo-Press volas kunhelpi popularigi la Esperanto-elsendojn kaj instigi la esperantistojn regule kaj multnombre aŭskulti tiujn elsendojn. Sed ne sufiĉas nur aŭskulti. Ĉiu aŭskultanto devus aktive partopreni en la agado por plivastigi la elsendojn.

Jen do kelkaj proponoj:

Aŭskultu regule al la Esperanto-elsendoj! - Skribu regule al la aŭskultitaj stacioj farante komentojn, kritikojn, laŭdojn, proponojn pri la aŭditaj programoj. - Komentu kaj kritiku ankaŭ politikajn, ekonomiajn kaj kulturajn programerojn, ne nur Esperantajn! - Se vi havas sonbend-aparaton surbendigu interesajn elsendojn kaj prezentu ĝin al aliaj esperantistoj; instigu ilin fariĝi regula radio-aŭskultanto de E-elsendoj.

Fariĝu aktiva aŭskultanto kaj kunlaboranto de Esperanto-redakcioj. Raportu koncize kaj rapide pri gravaj Esperanto-aranĝoj kaj eventoj al la Esperanto-redakcioj, speciale al la Pola Radio Varsovio, kiu ja disponas pri la plej multa elsendo-tempo, laŭ jena skemo:

Kio ? Kie ? Kiam ? Donu koncizajn detalojn! Kunhelpu, ke la radio-elsendoj en Esperanto fariĝu plej aktualaj!

# Unua Konkurso de la Pola Radio en 1974

- **10-taga ekskurso tra Pollando**
- **multaj premioj kaj memordonacoj**

en enketo de la Pola Radio, anoncita por la eksterlandaj aŭskultantoj.

Al partopreno en la lotado de la premioj rajtigas respondo almenaŭ al unu el la jenaj demandoj:

1. **Kiujn internaciajn iniciatojn de Pollando vi opinias speciale gravaj kaj kial?**
2. **Kiuj problemoj estantaj objekto de la debatoj de la Konferenco pri la eŭropaj sekureco kaj kunlaboro plej multe interesas vin?**
3. **Kiuj elsendoj de la Pola Radio en la periodo januaro — februaro 1974, laŭ via opinio, plej interese prezentis la bildon de la nuntempa Pollando?**

La respondojn ni petas sendi al la adreso: Pola Radio, PL-00-950 Warszawa, P.O. Box 46, Pollando — en kovertoj signitaj per la devizo: „Konkurso", ĝis la 15a de marto 1974 (decidas la dato de la poŝta stampo).

La rezultoj de la konkurso estos anoncitaj en niaj disaŭdigoj la 16an de aprilo 1974. La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la Pola Radio.

Pola Radio

Partoprenu mem kaj partoprenigu aliajn. Ni deziras al vi bonŝancon!

Parolas Varsovio, naskiĝurbo de Esperanto

Radio Varsovio ĉiutage disaŭdigas en la internacia lingvo du programojn:

6,00 h - ondolongoj 41 m, 49 m, 200 m

16,30 h - ondolongoj 31 m, 41 m

Ĉiutage, escepte de la dimanĉoj kaj festotagoj, je la 16,30 h, oni povas aŭdi novaĵojn de la radia ĵurnalo kaj en ambaŭ elsendoj komentariojn pri polaj kaj esperantaj temoj.

Lunde: 6,00 h - Esperanto-Ekspreso (ripeto de la dimanĉa posttagmeza programo en plenampleksa versio)

16,30 h - Koncerto kun bondeziroj

Marde: 6,00 h - Koncerto kun bondeziroj (ripeto)

16,30 h - Pri kio oni parolas en Pollando? - El la vivo de Pola Esperanto-Asocio

Merkrede:

6,00 h - Pri kio oni parolas en Pollando? (ripeto) - El la vivo de Pola Esperanto-Asocio (ripeto)

16,30 h - Socia problemaro

Ĵaŭde: 6,00 h - Rekte el Pollando (diversspecaj magazinoj)

16,30 h - Leterkesto

Vendrede:

6,00 h - Leterkesto (ripeto)

16,30 h - Anguleto por la nevidantaj esperantistoj (la unuan vendredon de la monato) - Kultura programero

Sabate: 6,00 h - Kultura programero

16,30 h - La semajno en Pollando

Dimanĉe:

6,00 h - La semajno en Pollando (ripeto en pli ampleksa versio)

16,30 h - Panoramo de internacia eventoj - Esperanto-Ekspreso (malpli ampleksa versio)

Esperanto-anguletoj en la nacilingvaj programoj

En la germanlingva programo de la Pola Radio:
Dimanĉe 22,00 h; ondolongoj 41 m, 49 m

En la svedlingva programo de la Pola Radio
Marde 16,00 h; ondolongoj 49 m

En la danlingva programo de la Pola Radio
Dimanĉe 21,00 h; ondolongoj 41 m, 49 m

La kelkminutaj anguletoj pritraktas ĉefe Esperanto-temojn.

La konstantaj eroj de Pola Radio Varsovio

El la vivo de la Pola Esperanto-Asocio - felietono pri la agado de PEA, organizaj problemoj, interesaj iniciatoj de la asocio.

Esperanto-Ekspreso - la atingaĵoj de la tutmonda esperantista movado prezentiĝas en la formo de novaĵoj, intervjuoj kun esperantistoj, recenzoj de Esperanto-publikaĵoj, diversaj konstantaj rubriketoj.

Koncerto kun bondeziroj - Esperanto-kanzonoj kun mesaĝvortoj de esperantistoj al esperantistoj. La servon de la bondezirkoncertoj oni profitas senpage. Ĉiu salutota persono estos antaŭinformita pri la tago de la koncerna "koncerto".

La semajno en Pollando - sonrevuo de la plej gravaj kaj plej interesaj okazintaĵoj dum la sep tagoj pasintaj en Pollando.

Leterkesto - en ĝi estas citataj kaj komentataj leteroj de la aŭskultantoj, ankaŭ la sonbendaj. Kadre de la Leterkesto vi aŭdos de tempo al tempo pritrakton de lingvaj demandoj. Ĉiam la unuan ĵaŭdon de la monato oni anoncas en la Leterkesto la rezultojn de la konstanta "Konkurso pri la plej interesaj leteroj de la pasinta monato". Valoraj popolartaĵoj, fotoalbumoj, muzikdiskoj, Esperanto-eldonaĵoj atendas la skribemajn aŭskultantojn.

Panoramo de internaciaj eventoj - traktas la mondajn politikajn eventojn en la pasinta semajno, kiel ilin vidas la pola publika opinio.

Pri kio oni parolas en Pollando? - tiu ĉi felietono traktas plej gravajn eventojn, polajn kaj internaciajn, sed ankaŭ tuŝas aferojn malpli ranghavajn, pri kiuj oni parolas kaj diskutas.

Rekte el Pollando - diversformaj, unu- aŭ plurtemaj magazinoj pri plej diversaj sferoj de la vivo en Pollando. Ofte kadre de tiu ĉi programero oni prezentas Esperanto-temojn.

Adreso: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46,
PL-00-950 Warszawa 1, Pollando

**************************

Parolas Gdańsk

Pola Radio en Gdańsk de la jaro 1960 preskaŭ sen-interrompe dissendas en Esperanto. La dissendoj nun okazas dufoje en la monato kun dekminuta programo, parte en pola, parte en Esperanto.
Enhavo de la dissendoj: Informoj, ĉefe turismaj kaj kulturaj, pri la marborda regiono, respondoj al leteroj de aŭskultantoj kaj ankaŭ iun kanzonon en Esperanto.
Elsendo-tempo: Ĉiun duan vendredon je la 1a horo kaj 10 minutoj nokte sur longaj ondoj de Varsovio 1322 m
Ripeto: La sekvan lundon je la 14 horo sur la ultra-kurtondoj de Varsovio, aŭdeblaj en tuta Pollando,kaj ankaŭ sur kelkaj mallongaj ondoj.

Skribu al Pola Radio - Elsendoj en Esperanto
PL-80-952 Gdańsk, Ul. Uphagena 1, Pollando

****************************

Ĉiusemajnaj elsendoj el Vieno

Ekde la 3 nov 1973 la mallongonda servo de ORF Wien "Österreich auf Kurzwelle" dissendas ĉiusemajne 10-minutan programon em Esperanto.

Ĉiusabate 17,45 - 17,55 h 6155 kHc (49 m) por Eŭropo
17780 kHc (16 m) por Aŭstralazio kaj Azio Sudorienta

Ĉiudimanĉe (Ripeto de la sabata programo)
6,45 - 6,55 h 6155 kHc (49 m) por Eŭropo
7250 kHc (41 m) por Eŭropo Sud-orienta
12705 kHc (25 m) por Aŭstralazio kaj Azio Sudorienta

Programo: 5 minutojn Novaĵoj, komentarioj elektitaj de la Radio-stacio, la restajn 5 minutojn raportoj verkitaj de la Esperanto-kunlaborantoj.

Adreso: ORF Wien, Österreich auf Kurzwelle, Dr. Alfred Macher,
A-1040 Wien, Argentinierstr. 30a

Ĉiumonataj elsendoj el Vieno

Esperanto-Informoj (Esperanto-Nachrichten) en la regiona programo por Vieno, Malsupra Aŭstrio kaj Burgenlando (aŭdebla ĉefe nur en tiu regiono)

Ĉiun kvaran merkredon de la monato, je la 13,30 h sur la ondo 203,4 m (1475 kHc) kaj sur ultra-kurtondoj. Adreso: Radio Wien, Esperanto, Argentinierstr. 30a, A-1040 Wien.

La venonta elsendookazos merkrede, la 23an de januaro 1974, 13,30 h.

Parolas Zagreb en Esperanto

Ĉiu-ĵaŭde, 5 minutojn post noktmezo, aŭdiĝas la Esperanto-voĉo de Zagrebo kun "Novaĵoj el Jugoslavio" kaj felietonoj aŭradiaj artikoloj, ne mankas informoj pri la E-movado. Ĉiun lastan ĵaŭdon de la monato oni respondas al korespondaĵoj de aŭskultantoj kaj mencias resp. mallonge recenzas ricevitajn periodaĵojn.

Elsendo-tempo: Ĵaŭde, 00,05 -0,20 horo sur meza ondo 264 m (1163 kHc)
Adreso: Radio Zagreb, Esperanto-Fako, YU-41000 Zagreb.

Romo en Esperanto

La Esperanto-elsendoj de Radio Romo okazas ĉiun dimanĉon je la 21,00 - 21,20 horo sur la jenaj ondoj:

30,90 m (9.710 kHc), 41,24 m (7.275 kHc) 50,08 m (5.990 kHc)

La elsendoj temas pri "Novaĵoj el Italujo", Leterkesto kaj "Kuriero de Esperanto".

Adreso: Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, I-00100 Roma, Italio

Svisaj Esperanto-elsendoj

La svisaj Esperanto-Elsendoj okazas kvarfoje semajne sur jenaj ondoj: 75,28 m (3985 kHc), 48,66 m (6165 kHc) 31,46 m (9 535 kHc)

Elsendo-tempo: Lunde kaj merkrede je la 13,20 - 13,30 h
Ĵaŭde kaj sabate je la 21,45 - 21,55 h

La programoj konsistas el informoj, prelegoj kaj komentarioj pri eventoj en Svislando kaj en konekto kun Svislando. Sed ne mankas informoj pri Esperantaj aferoj.

Adreso: Schweizerischer Kurzwellendienst, Esperanto-Abteilung, CH- 3000 Bern 16, Svislando.

Parolas Pekino

La Esperanto-elsendoj por Eŭropo de Radio Pekino okazas vendrede kaj sabate sur la ondoj 43 m, 33,m, 31 m je la 21,00 - 21,30 horo.
La programo ampleksas informojn kaj novaĵojn el Popola Respubliko Ĉinio, komentariojnaŭ disaŭdigonde artikoloj el Pekinaj gazetoj pri internaciaj eventoj kaj ĉinlingvajn muzikaĵojn kun Esperanto-klarigoj. Krom la elsendoj al Eŭropo Pekino dissendas al Japanio kaj Koreio kaj al Sudorienta Azio.

**********

Krom la menciitaj radio-stacioj elsendas ankaŭ aliaj stacioj en aliaj mondopartoj, kiuj tamen en meza Eŭropo ne aŭ malbone estas riceveblaj.

**********

Romo, Berno kaj Varsovio dissendas senpage programfoliojn kaj aliajn manuskripojn. Petu tuj vian ekzempleron!

**********

Skribu vian opinion pri la Esperanto-elsendoj al la koncernaj radio-stacioj, sed ankaŭ al la eldonanto de ĉi tiu folio por eventuala publikigo: Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113, FRG.